



# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Januaro: 4 2023

## LA AKTORO ALEC BALDWIN AKUZOTA PRI SENINTENCA MORTIGO

La prokuroro de la urbo Santa Fe en la usona ŝtato Nov-Meksiko informis, ke oni akuzos la aktoron Alec Baldwin kaj la film-asistanton Hannah Gutiérrez-Reed, pri la senintenca mortigo de Halyna Hutchins, direktoro pri fotografio de la filmo *Rust*, okaze de la filmado de sceno.

Kiel sciante, la aktoro uzis pafilon, kiu devus enteni nur blankajn kartoĉojn. Tamen, ene de ĝi troviĝis aŭtentikaj kugloj kiuj okazis la morton de S-ino Hutchins. Respondeculo de la prokurora oficejo de la urbo Santa Fe sciigis, ke en ĉi tiu jura proceso ĉiuj homoj estas tute egalaj, do, konataj hollywoodaj aktoroj ĝuas nenian privilegion. Same, oni deziras pritrakti dum la proceso, la mankon de sekureco dum la produktado de filmoj, ĉar kunekzisto de aŭtentikaj kugloj kaj blankaj kartoĉoj ene de filmo-pozejo, ne povas plu-okazi. Laŭ enketo de la nov-meksika polico, ĉe la pozejo de la filmo *Rust* oni trovis entute 500 kuglojn, inter aŭtentikaj kaj ne-danĝeraj.

La oficiala akuzo okazas 15 monatoj post la terura akcidento. Tiam la



aktoro, antaŭ la komenco de la filmado, decidis praktiki pafadon. Li uzis pafilon kaj li celis kameraon. Post tiu kamerao troviĝis S-ino Hutchins, kiu ricevis mortigan pafon surbrusten, ŝi tuj mortis.

La aktoro rifuzis kian ajn kriman respondecon pro la morto de la direktoro pri fotografio. Li akuzis s-inon Gutiérrez-Reed, kiel respondeculinon de la armiloj uzataj dum la filmo, kaj la direktor-asistanton s-ron David Halls, kiu ekriis "*Malvarman Pafilon*" antaŭ ol komenci la filmadon kaj havigi la pafilon al S-ro Baldwin. Tamen, s-ro Halls neniam certigis ke la pafilo havis taŭgajn kartoĉojn. Alie, David Halls jam akceptis la akuzon pri senintenca uzo de armilo kaj pro tio li jam ricevis 6-monatan kontrolitan liberigon.

# Vorto de la Semajno

## Ĉeko:

Pagordono, per kiu la subskribanto ordonas al sia banko, ĉe kiu li havas bonhavan konton, ke ĝi pagu ĉe vido la tie skribitan sumon al la nomita profitanto aŭ al ties ordono.

**Fari ĉekon:** Subskribi la dokumenton pere de kiu ordonas la pagon.

**Monigi ĉekon:** Transformi ĉekon en monon.

**Ĉeko pagenda al la portanto:** Ĉeko sur kiu la profitanto ne estas nomita, do oni konsideras, ke la profitanto estas tiu kiu posedas la ĉekon.

**Ĉekaro:** Kajereto, konsistanta el difinita nombro da elŝireblaj ĉekoj.

**Poŝtĉeko:** Ĉeko, per kiu la subskribanto ordonas al la poŝtoŭficejo, ĉe kiu li havas bonhavan konton, ke ĝi pagu la skribitan sumon al la nomita profitanto.

**Vojaĝ-ĉeko:** Ĉeko farita de banko aŭ financa institucio, pagebla de alia oficejo de tiu banko ĝenerale en eksterlando.

**Nekovrita ĉeko:** Ĉeko, por kies pago ne estas bonhavo.

**Trastrekita ĉeko:** Ĉeko, kiu, surhavanta du oblikvajn strekojn, estas pagebla ne per mono en la manojn de la profitanto, sed nur en la konton de la profitanto ĉe ties propra banko.

*Sinonimoj: bilo,ambio,trato.*



Ni petas al ricevantoj de “*JURA SEMAJNO*” kiuj pripensas ŝanĝi siajn ret-poŝtojn aŭ ekuzi aliajn novajn, bv. sciigi pri tio al nia redakcio, tiel ni povos daŭrigi la sendon de la bultenon kaj certigi la bonordan ricevon de la ĉiusemajna jura informilo. [jurista@esperanto.ac](mailto:jurista@esperanto.ac)